1 FRAKSENO

Fraxinus

1987

Tiu arbo vintre estas facile rekonebla pro siaj nigraj foliburĝonoj, ankaŭ nomataj kapropiedoj. Poste venas la purpurruĝaj floraj panikloj, kiuj poste fariĝas grandaj faskoj: la tielnomataj fraksenaj ŝlosiloj.
La frakseno, kiu povas iĝi 45 metrojn alta kaj atingi la aĝon de 250 jaroj, ĉiam estis beno por la homaro. La folioj estas bonega furaĝo por kaproj, ŝafoj, bovinoj, ĉevaloj kaj eĉ por cervoj. Ĝi estas ronĝita ankaŭ de laŭsoj, kiuj postlasas specon de mielo, el kiu oni produktas ŝaŭmvinon.
La ligno estas nefendiĝema, malmola kaj elasta, kio igas ĝin bonega materialo por (ĝardenaj) iloj aŭ radaksoj. Ĝi estis uzita eĉ sur la ĉasio de kelkaj aŭtoj kaj aviadiloj.
La frakseno ludas gravan rolon en tradicia medicino: fraksena teo estas diurezilo kaj la folioj helpas kontraŭ inflamoj.
Se io havas tiom da bonaj kvalitoj estas facile kompreni, ke ĉi tiu arbo estas la plej ŝatata hejmo de feoj kaj gnomoj.

www.josvertelt.nl

Ook in andere talen →

Also in other languages →

Ankaŭ en aliaj lingvoj →